



(En la retpaĝo <http://www.ts-adyar.org/content/henry-steel-olcott-1832-1907> troviĝas detala priskribo de la vivo kaj verko de Kolonelo Olcott. Mi tradukis la parton "Biografia Informo", kiu estas resumo.)

HENRY STEEL OLCOTT (1832-1907)

Prezidanto-Fondinto de La Teozofia Societo, 1875-1907

Li naskiĝis la 2-an de aŭgusto de 1832 en Orange, Nov-Jerzejo, Usono.

23-jaraĝa li gajnis internacian renomon pro sia laboro pri la modela bieno de Scienca Agrikulturo en Newark. Li malakceptis la Katedron de Agrikulturo en la Universitato de Ateno (Grekujo) proponita de la greka registaro. Li kunfondis la Westchester Farm School [Biena Lernejo Westchester], proksime al Mount Vernon, ŝtato Novjorko, la unua usona Scienca Lernejo de Agrikulturo. Lia unua libro *Sorghum kaj Imphee* iĝis lerneja lernolibro kaj alportis al li – 25-jaraĝa – proponojn por fari registaran botanikan mision al Caffraria, Suda Afriko, iĝi direktoro de Agrikultura Buroo en Vaŝingtono kaj labori kiel manaĝero de du grandegaj bienoj. Li malakceptis ĉiujn.

26-jaraĝa li faris rondvojaĝon tra Eŭropo studante la tiean agrikulturon, kaj lia raporto estis eldonita en la *American Cyclopaedia* [Amerika Enciklopedio]. Li iĝis usona korespondanto de la revuo *Mark Lane Express* (Londono), Agrikultura Kunredaktoro (1858-60) de la *New York Tribune* kaj publikis du pliajn librojn pri agrikulturo. Pro lia publika servo al la agrikultura reformo li gajnis du honorajn medalojn kaj arĝentan pokalon.

Kiel raportisto por la gazeto *New York Tribune* Olcott ĉeestis en 1859 la pendumon de John Brown, kaj – kvankam en konsiderinda danĝero – eltiriĝis sub la sigelo de framasona konfido. Li aliĝis al la Norda Armeo, batalis dum la Nord-Karolina Kampanjo kaj revenis pro invalideco al Novjorko (1862-1865). Li estis varbita de la Ministerio de Milito kaj poste de la Mararmea Ministerio kiel Speciala Komisararo por la esploro de fraŭdoj. Puriginte - en danĝero de morto kaj de perdo de reputacio - la Publikan Administracion, li ricevis altan laŭdon. En 1868 li estis akceptita al la advokataro.

Li laboris kiel advokato ĝis 1878, specialiĝante en kazoj de dogano, enspezoj kaj asekuro. Dum li estis Sekretario kaj Ĝenerala Direktoro de la Nacia Asekura Konvencio (konferenco aŭ ligo de ŝtataj funkciuloj por kodigi kaj simpligi leĝojn pri asekuro), li publikigis valoran raporton pri asekuroj. Statuto redaktita de H.S.O. kaj alia advokato estis akceptita en dek Ŝtataj Parlamentoj. Kiel advokato li havis klientojn kiel la urbo de Novjorko, Borso de Novjorko, [...], Gold Exchange Bank, Fervojoj de Panamo kaj The United Steel Manufacturers of Sheffield [La Unuiĝintaj Ŝtalfabrikantoj de Sheffield], Anglujo.

Li estis Honora Sekretario de la Nacia Komitato de Civitanoj kaj laboris kun la franca registaro por la unua Internacia Ekspozicio de Mondaj Industrioj; ankaŭ deĵoris en la Itala

Internacia Komitato por starigi statuon al Mazzini en Novjorko. Li estis nomumita de la retiriganta Vicsekretario pri Fisko kaj listigita de Prezidento Johnson por transpreni tiun oficon, sed li apogis la Kongreson kontraŭ la prezidento kaj perdis la nomumon. Li estis membro de la Lotuso Klubo kaj intima amiko de Mark Twain kaj de aliaj famaj aŭtoroj.

Interesita pri Spiritismo ekde la aĝo de 19, li raportis la psikajn fenomenojn ĉe Eddy Farm [Bieno de Eddy] en 1874 por la gazetoj *New York Sun* kaj *New York Graphic*. Kopioj [de tiu raporto] estis venditaj je 1 dolaro, kaj sep eldonistoj konkuris pri la eldonrajtoj. En 1875 la raporto estis publikigita kiel *People from the Other World* [Homoj de la Alia Mondo], unu el la plej fruaj libroj pri Psika Esploro, alte laŭdita de Alfred Russel Wallace kaj de Sir William Crookes (ambaŭ Membroj de la Reĝa Societo, Anglujo).

Ĉe la Bieno Eddy li renkontis Helena Petrovna Blavatsky. Kune ili defendis la realecon de spiritismaj fenomenoj, samtempe provante purigi la spiritistan movadon de ĝia materiisma tendenco. Li helpis ŝin prepari ŝian libron *Izisa Senvualita*. Kune ili fondis La Teozofian Societon (TS) en Novjorko la 17-an de novembro de 1875. En 1876 li organizis la unuan publikan kremacion en Usono. En 1879 la kunfondintoj translokis la Sidejon de la TS al Bombajo [nun Mumbajo], Hindio.

Antaŭ ol forvojaĝi, H.S.O. ricevis de la usona prezidento aŭtografitan leteron de rekomendo al ĉiuj usonaj ministroj kaj konsuloj, kaj de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj specialan diplomatan pasporton kaj la komision raporti al la registaro pri la realigeblo pligrandigi la komercajn interesojn de Usono en Azio.

En 1879 li organizis en Bombajo la unuan Ekspozicion *Swadeshi*. Kiel Prezidanto de la TS li defendis en Hindujo, Cejlono [nun Sri-Lanko], Japanujo kaj aliaj orientaj landoj la renaskiĝon de Hinduismo, Budhismo, Zoroastrismo, Islamo kaj aliaj religioj. Li stimulis la reviviĝon de Sanskrito. La sektoj de Cejlono li unuigis en la Budhisma Sekcio de la TS (1880), la 12 sektoj de Japanujo en Komuna Komitato por la subteno de Budhismo (1889), la budhistojn de Birmo, Siamo [nun Tajlando] kaj Cejlono en Konvencio de Sudaj Budhistoj (1891) kaj fine la Nordan kaj la Sudan Budhismon tra la komunaj subskriboj al siaj Dekkvar Proponoj de Budhismo (1891).

Kun delegacio de budhistoj en hindua templo en Tinnevely [nun Tirunelveli, Hinda Unio], li plantis en 1882 'Arbon de Amikeco' kiel unua akto de interfratiĝo inter budhistoj kaj hinduoj ekde centoj da jaroj. En 1886 li fondis la Bibliotekon Adyar, en kiu unuafoje en la historio la religiaj instruistoj de Hinduismo, Budhismo, Zoroastrismo kaj Islamo kuniĝis por beni la komunan aferon.

Pro la vizio de HSO estis disvolvita la principo de aŭtonomaj Sekcioj [de la TS] kun internacia Sidejo.

Praktikante mesmerisman resanigon, li kuracis en unu jaro (1882-83) kun fenomenaj sukcesoj 6.000 kriplulojn, surdulojn, mutulojn, blindulojn kaj frenezulojn. Li startis la Liberajn Lernejojn "Olcott Harijan" por la eduko de la parioj de Hindio. En tuta Hindujo li fondis hinduajn lernejojn, Knabajn Arjajn Ligojn kaj bibliotekojn, kaj sponsoris kaj eldonis la gazeton *Arya Bala Bodhini* por hinduaj knaboj. En Cejlono li establis lernejojn por budhistaj infanoj. Por la cejlonaj budhistoj li atingis liberecon de religia persekutado kaj la feston *Wesak* kiel publikan ferion. En 1891 li patronis neformalan konferencon pri la ebleco de Virina Nacia Societo en Hindujo. Li planis instituton de teknologia eduko por la Maharago de Baroda (1888).

Por la TS li prelegis kaj vojaĝis ĉiujare multajn milojn da kilometroj tere kaj mare. Li estis nomumita Honora Membro de multaj famaj kluboj kaj kleraj societoj. Li ricevis la oficialan benon de papo Pio Nono kaj estis benita de la Budhismaj Altaj Pastroj de Cejlono, Birmo, Siamo kaj Japanujo pro sia laboro por la budhismo (li estis preninta *Pancha Sila* kiel

budhisto en 1880). Li ankaŭ estis adoptita en la bramana kasto pro siaj eminentaj servoj al hinduismo.

Li mortis la 17-an de februaro de 1907, en Adyar, nomuminte Annie Besant kiel sian posteulinon.

Publikaĵoj

Li redaktoris la revuon *The Theosophist* post kiam H.P.B. estis irinta al Eŭropo en 1885. Li publikigis *The Buddhist Catechism* [La Budhisma Katekismo] – internacie uzata lernolibro, tradukita en 20 lingvojn –, *Old Diary Leaves* [Folioj de Malnova Taglibro], la historio de la TS (en ses volumoj), kaj multajn broŝurojn kaj artikolojn pri Teozofio, religio, psikaj fenomenoj ktp.

Fontoj

1. 'Henry Steel Olcott: A Buddhist Apostle', Charles S. J. White, *The Theosophist*, Vol. 94, Numero 7, Aprilo 1973.
2. 'Colonel Henry Steel Olcott', Annie Besant, *The Theosophist*, Vol. 127, Numero 2, Novembro 2005.
3. *A Short History of the Theosophical Society*, kompilita de Josephine Ransom, TPH [Teozofia Eldonejo], 1989.
4. *Reminiscences of Colonel H. S. Olcott*, TPH [Teozofia Eldonejo], 2006.